## ĈAPITRO XII

### ALICIO ATESTANTO

"JEN mi" ekkriis Alicio. Pro la eksciteco sin trovi alvokata, ŝi tute forgesis ke dum la lastaj minutoj ŝi tre multe kreskis; kaj tiel subite ŝi eksaltis supren, ke ŝi renversis per la jupo la ĵurintarujon, kaj faligis ĉiujn ĵurintojn sur la kapojn de la sube starantoj.

Jen ili kuŝis sur la planko kaj senhelpe baraktadis, rememorigante al ŝi kio okazis en la hejmo antaŭ unu semajno, kiam ŝi akcidente renversis el globo aron da ruĝaj fiŝoj.

"Ho, pardonu, mi petegas" "si ekkriis tre ĉagrenite, kaj komencis kiel eble plej rapide relevi ilin. La ĵus aludita akcidento ja venigis en ŝian kapon la ideon ke, se ŝi ne sukcesos tuj kolekti kaj residigi ilin, ili nepre mortos.

"La proceson oni ne povas daŭrigi" diris la Reĝo per tre serioza voĉo, "ĝis ĉiuj ĵurintoj residiĝos—*ĉiuj*." Ripetante la lastan vorton, li fikse rigardis Alicion.

Alicio do rerigardis al la jurintarujo, kaj vidis, ke pro sia eksciteco ŝi remetis la Lacerton kun





la kapo malsupren. Pro tio l
besteto melankolie ŝvingadis la v
ne povis rektigi sin. Elpreninte ĝ
ĝin konvene. Tamen *private* ŝi
"Bil" havus egale saman valoron
ĉu li sidus renversite aŭ kapsupre.

Kiam la ĵurintoj iom retrank
renversiĝo, kaj oni trovis kaj re
ardezojn kaj grifelojn, ili tuj kom
plenan historion de la akcidento,
Lacerton, kiu pro la terura ŝok
buŝo malfermita kaj rigardis la p

— "Kion vi scias pri ĉi tiu af
demandis al Alicio.

"Nenion" ŝi respondis.

"Nenion ajn?" persistis la Re

"Nenion ajn."

"Tio estas tre grava" diris la
sin al la ĵurintoj.

Tiuj ĵus komencis skribi tion
Sed la Blanka Kuniklo tre sulki
kaj faris al la Reĝo malaproban
per tre respekta voĉo: "Kompre
Moŝto intencis diri *mal*grava?"

"Malgrava, kompreneble" la R
Tamen, mallaŭtvoĉe li daŭre
"grava, malgrava, malgrava, grava
sperimentas kiu vorto havas la p

Kelkaj ĵurintoj skribis "grava

LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURST